

ESPERANTO KIEL REVELACIO

I

Post la Morto

Post kiam mi vekigis ekster la strikta vesto el la fizika korpo kaj jam venkis la naturan emocion naskitan de la proceso liberiganta la animon, nebridebla deziro de libereco ekscitis min.

Devigita korekti la informan bildon starigitan de la teologiaj difinoj, mi vekigis kaj, akceptante la trudojn de la propra renovigo, mi revis trairi la vojojn de la mondo. Mi revis koni, fine, la Teron! Aŭskulti ĝiajn maljunecon kaj grandecon! Penetri la kulturon de la popoloj kaj proksime senti la tuton de iliaj tradicioj kaj legendoj, kredaĵoj kaj kutimoj! Ne nur aŭskulti la vortojn nunelparolatajn ĉe la ruinoj de Teboj aŭ en la temploj de Benareso, sur la stratoj de Ateno aŭ sur la sanktaj lokoj de Jerusalemo, ĉe la relikvoj de Romo aŭ sur la kampoj de Francujo, sed ankaŭ parole rimarkigi la notojn de la arkivistoj de la spirito, notojn gardantajn la saĝon de Egiptujo kaj protektantajn la Manava Dharma Sastra-n aŭ la Leĝojn de Manuo el la bramana Hindujo, Leĝojn registrantajn la notojn de Sokrato kaj la originalajn lecionojn de Jesuo, kaj kiuj povos malkaŝi al ni la ediktojn de la Romaj imperiestroj kaj ripeti la parolojn de Vercingetorix, la galla heroo, kapitulacinta al la soldatoj de Julio Cezaro, por ornami ties triumfon!...

Kiu, dum la eŭforio de maldensigita spirito, ne aspiras transporti sin, de surprizo al surprizo, al la sfero de la intelekto, simile al la faleno ebria de libereco kaj lumo, flirtanta de floro al floro?

II

Lingva Problemo en la Spirita Mondo

Sed en la sfero plej proksima al la Tero la lingvoproblemo apartenas al la nombro de tiuj, kiuj plej afliktas nian konsciencon.

Efektive, la simbola lingvaĵo estas plej grava por la grandaj kolektivoj de la Spiritoj noble progresintaj.

La regado de la pura arto estas tie la senĉesa sublimiĝo de la Naturo.

La muziko diigas la frazon kaj la pentrarto rafinas la figuron; skulptiĝas elokventaj monumentoj kaj gravuriĝas fulmobrilaĵoj poemoj, per la asociiĝo de koloroj kaj sonoj, ĉe la miregiga kemio de la penso.

Tiu loĝejo de numesoj, simila al la Kampoj Eliziaj de la mitologia tradicio, situas tamen multe transe de la homa hejmo, kie floras la espero.

Eĉ tie ĉi, kvankam malfermiĝas milionoj da renovigaj horizontoj, ni tamen estas disigitaj de la lingva baro.

Pioniroj de la progreso, ili laŭbezone kontaktas kun noblaj idiomoj aŭ superregas dialektojn tie kaj ĉi tie. Tion tamen ili efektivas kun reduktita profito en la eduka laboro, kiun ili celas realigi.

Por tio, la plej kapablaj, el la morala vidpunkto, reenkarniĝas en la landoj kaj regionoj, kiuj dediĉas al ili ian korinklinon, oferante sin por la kultura havaĵo ilin karakterizantan, konsumante jardekojn por ke tiuj regionoj liveru al siaj konceptoj mem tiun aŭ alian rimedon por ilia pliboniĝo.

Tio okazas, ĉar la parolo eldirita aŭ skribita ankoraŭ estas aŭ estos dum jarmiloj la agente de transsendo de la spiritaj valoroj, stariganta la kuniĝon de la animoj sur la vojo al la Granda Lumo, en la regionoj de la lernado, en kiuj efektiviĝas la evoluaj luktoj.

III

Malsameco de Lingvoj kaj Disiĝo de la Spiritoj

En la malsuperaj klasoj sur la Tero, la estaĵoj kun karaktero rudimenta pro la primitiveco de siaj karakterizaj esprimoj facile korespondas unuj kun la aliaj.

La bovoj el siria paŝtejo muĝas simile al la samspecaj brutoj en ĉilia bieno, kaj la ĝemo de hundo en Londono estas tute identa al la akuta ploro de hundo en Tokio.

Sed inter la fonemo kaj la artikulaciita lingvo staras miloj da jarcentoj, atestante la marŝon de la intelekto.

Se la besto, rilate al la homo, estas limigita al la malvasta ĉambreto de la interjekcio, la homo, rilate al la anĝelo, ankoraŭ troviĝas enŝlosita en la karcero de la vorto.

Tial, malgraŭ la nekontestebla mensa reflektado, inter la estuloj enkarniĝintaj kaj inter la estuloj elkarniĝintaj, la lingvo estas vehiklo de la plasmado, kiu kreas la penson, plivastigante aŭ enkistante ĝin, konforme al la vasteco de sia radio de agado.

Tiamaniere, la konkeroj de iu popolo estas enfermitaj kun ĝi en ĝia lingva mondo, kio ja prokrastas senfine la providencan interŝanĝon, kiu farus la plej klerajn naciojn senperaj mentoroj de tiuj ankoraŭ ne progresintaj.

Pro tio, Oriento kaj Okcidento ĉiam nutris inter si profundajn antinomiojn, kaj rasoj malsamaj interbatalas jam de pratempaj civilizacioj, katenitaj al la niveloj de siaj propraj ideoj, kristaliĝintaj ĉe la politika aŭ religia hegemonio, subtenantaj periodajn militojn de persekutoj kaj ekstermo, en kiuj longaj tempospacoj estas oferitaj por dezertigo kaj disigo, en kiuj la malklereco ŝanĝiĝas en danĝeran ekzekutiston, kvankam la elaçetaj principoj, formulitaj de la pioniroj de la evoluo, kaj alvokantaj la surterajn patrujojn al pliboniĝo kaj fratamo, ripozas en la riĉaj kaj ŝimaj bibliotekoj, simile al kleraj mortintoj.

IV

Neceso de unu Lingvo Internacia

Tiamaniere, ne nur por la kontentigo de homaj pretendoj urĝiĝis la kreado de unu helplingvo, kiu interligus la teritoriojn de la spirito. Urĝiĝis ia sistemo de komuneco, kiu liberigus la batalantojn de la intelekta progreso, je pli grandaj embarasoj, por aliri al la plej altaj tipoj de kulturo...

Milionoj da animoj deziregis liberiĝi de la lingvaj katenoj, mumiigantaj al ili la esprimojn.

Spiritoj kapablaj por vastaj flugadoj sur la ĉielo de la scienco kaj arto, de la instruo kaj industrio, limigis sin al la mensaj preceptoj kaj ritoj de la rigionoj, kie ili agadis aŭ renaskiĝis, sufokitaj en la malvasta cirklo de malabunda votprovizo, kvazaŭ iaj birdoj de majesta povo, enfermitaj en la fera kaĝo de malklereco.

Grandaj imperiaj kolektivoj, kiel Ruslando kaj Britujo, montriĝis dividitaj en diversaj lingvoj kaj pluraj dialektoj, simile al gigantaj korpoj, en kiuj la mensa sango cirkuladus nesufiĉa.

Kaj trans la pejzaĝo ĝustadire surtera, la estuloj liberiĝintaj de la fizika ĉaro, se eksterordinare evoluintaj en la intertempo inter la necesaj reenkarniĝoj, plejofte ne sukcesis transpasi la limon de realigoj de la rasaj grupoj, al kiuj ili estis jungitaj.

Saĝuloj el la aziaj, afrikaj, amerikaj, slavaj, saksaj kaj el aliaj landgrupoj interŝanĝis spertojn, oferante neanstataŭigeblajn kapitalojn de tempo.

Konstatante la senlimajn malfacilaĵojn por la interŝanĝo fare de elkarniĝintaj triboj kaj popoloj, spiritaj fakuloj pri fonetiko, etimologio kaj onomatopeo kreis internacian idiomon por tuja kompreno en la spacaj regionoj proksimaj al la Terglobo, vane multobligante provojn kaj eksperimentojn, ĝis unu el la grandaj misiuloj de la Lumo, sindoninta al la konkordo, prenis sur sin la ekzameno kaj la solvado de la problemo.

V

Kreado de Esperanto ĉe la Spiritoj

Novaj perspektivoj malfermiĝas, promesplenaj.

Kunvokinte kompetentajn helpantojn, la unuiginto iniciatis vastajn studojn kaj, kunigante la plej konatajn idiomajn radikojn de diversaj popoloj, li efektivigis, dum preskaŭ duona jarcento da laboro, la subliman verkon.

Helpata de multnombraj grupoj da kunlaborantoj, kiuj akordis kun lia idealo, la geniulo de la homara kunfratigo, kiun ni konas per la nomo Lazaro Ludoviko Zamenhof, inventis, per la dia inspiro, la miregindan Esperanton, determinante la starigon de respektivaj akademioj en la spiritaj sferoj ligitaj al la plej kleraj nacioj de nia Planedo.

VI

Kreado de Esperanto ĉe la Homoj

Post la rekono de la delikata mekanismo de la lingvo, kiu naskiĝis por fariĝi preciza faktoro de la alproksimiĝo de la spiritaj kolektivoj, alproksimiĝis la XIX-a jarcento kun grandega programo de renoviga laboro.

Falas bastionoj de fanatikeco kaj malklereco.

La scienca esploro malkaŝas novajn vojojn al la popola menso.

Prepariĝas sendotoj al la fizika kampo, por repacigo de la homoj.

La barko de Fulton, la lokomotivo de Stephenson, la elektra telegrafo de Morse, la aparato de Bell, la animitaj fotografaĵoj de la fratoj Lumière, la linotipo de Mergenthaler kaj la ondoj de Hertz antaŭanoncis la submarŝipon kaj la transatlantikan ŝipon, la modernan aŭtomobilon kaj la aviadilon, la kinon kaj la modernan aŭtomobilon kaj la aviadilon, la kinon kaj la grandan presarton, la telefonon, la radiofonion kaj la televidon de la nuntempo.

La profetaĵoj de Maxwell malfermis vojojn por la atomaj sciencoj.

Sur la scenejo de fulmobrilaj promesoj, Allan Kardec, kun la misio de Kodiganto de Spiritismo, malkovras al la homa spirito novajn kontinentojn el lumo, efektivigante la revivigon de Kristanismo, kaj, apenaŭ ĵetiĝas sur la Teron la heleco de la unua revelacia libro, en 1857, decidiĝis la reenkarneco de la granda kuriero de la frateco.

Enkorpigas do Zamenhof, en 1859, en hejmo el Polando, tiam unuigita al la Moskva Imperio, kies kunigitaj popoloj parolis kaj skribis en preskaŭ ducent malsamaj lingvoj.

Iom post iom reprenante la potencon, kiu en la Supera Sfero lin riĉigis, li sentas sin subtenata de la samaj amikoj, kiuj helpis lin en la kreado de la internacia idiomo.

Kaj, antaŭ la splitoj de la kritiko kaj sub la pikilo de sendankemo, turmentata, nekomprenata de la plimulto el la samtempuloj, vundita de multaj kaj ofendata ĉe siaj plej karaj sentoj, li restarigas Esperanton por la surteraj popolojiniciatantaj novan vojon por la monda unuiĝo.

VII

Mediuma Kontribuo por la Disvastigo de Esperanto

Ofte oni estas surprizita de la sinteno de pluraj elkarniĝintaj studemuloj, kiuj rekomendas, per la mediumaj kanaloj, la studadon de la internacia lingvo.

Sendube, ke Esperanto ne estas religia lernobjekto, sed fascina ŝlosilo de percepto, malkaŝanta neelĉerpeblajn tavolojn de supera kulturo.

Faciligi la komprenon estas ago de karitato, kaj konstrui la estontecon estas fidinda laboro.

Ĉia vojaĝo trans la limojn, en kiuj ni elvolviĝis jam en la naskiĝlando, postulas preparon.

Estas vane prizorgi pri pasporto por analfabeto, por ke li longe inspektu la kursojn de la Pariza Universitato, same kiel estas malagrabla meti iun sur la mirindajn pejzaĝojn de la svisa vintro, sem eĉ unu ĉifono da lanaĵo.

Lerni Esperanton, ĝin instrui, praktiki kaj disvastigi estas ja kontribui por la konstruado de ia Unuiĝinta Mondo.

VIII

Postuloj kaj Solidareco

La estuloj, kiuj hodiaŭ sidas ĉe la tablo por manĝi la panon de la karno, morgaŭ estos la estuloj de la reala vivo, nepre adaptiĝantaj al la spiritaj valoroj.

Liberiĝintaj de la fizika ĉaro, eĉ kiam ili estas ŝtonigitaj ĉe la antropocentraj ideoj, nutrantaj iliajn tagojn, ili neeviteble asimilos la imperativojn de sia propra liberiĝo, malfermante internajn fenestrojn, kiuj renovigos iliajn pensojn.

Se nuntempa ordinra homo, kiu, uzante ĵetaviadilon, povas forflugi el Ameriko, ripozi en Afriko, kaj pritrakti negocojn en Eŭropo, en kelkhora tempospaco, bezonas posedi diversajn lingvojn aŭ pagi al pluraj interpretistoj, por ke li povu sin movi sekure kaj profite, ni prezentu al ni la elkarniĝintan homon subite atakitan de la kompleksaj, novaj sensacoj, kiam la rompiĝo de lia sensoria kluzo troplenigas al li la sentumojn. La soifo de komunikiĝo kaj solidareco bruligas lian cerbon kaj subpremas lian koron.

Estas nepre necese paroli kaj aŭdi, percepti kaj kompreni, malŝarĝiĝi je malnovaj kondiĉoj, rompi malnovajn formulojn, alĝustiĝi al pli vastaj dimensioj, neniigi la pasintecon kaj rekomenciĝi de si mem.

IX

Internacia Idiomato kaj Universala Religio

Tiamaniere, ni, spiritualistoj kaj spiritistoj, enkarniĝintoj kaj elkarniĝintoj, atentu la pligrandiĝon de Esperanto, samtempe klopodante por la restarigo de la kolumnoj de Kristanismo kiel vivanta sanktejo de la Universala Religio, sur bazoj de amo kaj saĝo, sur la tereno de la Nemezurebla Boneco de Dio kaj ties ĉiama Justeco.

Ne gravas, ke, en la kondiĉo de esperantistoj, ni sintonizu kun niaj katolikaj, reformaciistaj, ortodoksaj, bramanaj, budhistaj, izraelistaj, sintoistaj, islamaj, zoroastristaj, ateistaj fratoj aŭ tiuj el ĉiaj ajn konfesioj kaj kredoj, ĉar la fluoj da ideoj, same kiel la malsamnivelaj fontoj elfluantaj en la maron, ĉiam atingas la oceanon de la neŝanĝema realeco, en kies akvoj la avertoj de la evoluado devigas nin rekoni nian propran malgravecon antaŭ la grandeco de la vivo, per la senpersonigo de nia fido.

Nu, ni portu la verdan standardon kiel simbolon de la unuiĝo!

Kiu ajn estu nia aĝo, ni lernu!

Kvankam nekomprenataj, ni iru antaŭen!

Ni persistu ĝojaj!
Esperanto signifas “tiu, kiu esperas”.
Marŝante kaj servante, kredante kaj semante, ni trankvile esperos.

X

Salute

Kaj nune, Zamenhof,
Ĉar forpasis jarcento
Jam, post alvano via
Al la mondo transiĝa,
Vian tutan grandecon.

Sed el la nokta fundo,
Kie malpaco svingas
Siajn mallumajn skurĝojn,
La stelo fulmobrila,
Kiun verdan vi kreis,
Anoncas l'unuiĝon.

Post via don' al homoj
De la luma mesaĝo:
— Esperanto sublima, —
Furiozaj militoj
Reskurĝis senkompate
Naciojn dividitajn.

Kaj ni, Esperantistoj,
Ĉe labor', disigitaj
Sur la tuta Terglobo,
Kun vi rediras já:
— Laŭdata estu Dio!
— Benata estu l'amo!...

Francisco Valdomiro Lorenz (Spirito)

(Mesaĝo psikografie ricevita de la mediumo Francisco Cândido Xavier, la 19-an de
Januaro 1959, en la brazila urbo Uberaba, MG, Brazilo.)